

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la svisa kurtonda radiostacio. Vi aŭdas prelegon de Claude Gacond, prezidanto de Esperanto-Edukistaro de Svislando, pri la centjara festo de la Ruĝa Kruco.

En 1859 ĝeneva spekulaciisto veturas Italion por ricevi la apogon de la imperiestro Napoleono la tria por siaj spekulacioj en Alĝerio. Li ĉeestas la batalon en Solferino kaj malkovras, kien kondukas la religio de la mono : al teruraj hombuĉadoj kiel Solferino. Ne plu estas spekulaciisto, kiu revenas Ĝenevon, sed verkisto, kiu dum sia tuta vivo per ĉiuj siaj fortoj luktos kontraŭ la milit-preparo. Tiu homo estas Henri Dunant. Lia libro *Rememore Solferinon*, kiu vokas la homojn al ekago kontraŭ la milito, havos grandan influon. Dank'al ĝi okazas en 1863 grava internacia diplomatia konferenco, kies rezulto estas la fondo de la Ruĝa Kruco.

Hodiaŭ la Ruĝa Kruco estas preskaŭ universala havante nacian sektion en preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo. Bedaŭrinde oni malbone konas la strukturon de tiu gravega movado. Ĝi konsistas el tri organizaĵoj :

1. La Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco, kies membroj nur povas esti svisaj civitanoj.
2. La Naciaj Societoj de la Ruĝa Kruco.
3. La Ligo de la Societoj de la Ruĝa Kruco.

La Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco okupiĝas pri internaciaj helpoj, pri la intervenoj, kiuj kaŭzas diplomatiajn klopodojn : helpo al militkaptitoj, interŝanĝo de kaptitoj, kontrolo de restadejoj. Dank'al sia neŭtraleco Svislando povas plenumi pere de la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco pacigajn kaj necesegajn taskojn. Koncerne la aferon pri Kubo, kiam la internacia situacio estis streĉe grava, dank'al sia morala prestiĝo tiu Internacia Komitato povis respondi al la alvoko de U Tant, la sekretario de UN, por favori kontaktojn inter delegacioj de Usono, Sovetio kaj Kubo. Tiu konflikto montris plian fojon, ke Svislando eble pravis, kiam ĝi petis specialan klaŭzon por povi fariĝi membro de UN : ke UN garantiu al Svislando ĝian rajton resti neŭtrala dum internaciaj konfliktoj. UN rifuzis al Svislando tiun rajton, kaj la sekvo estas, ke ni baldaŭ estos la lasta lando en la mondo, kiu ne havos delegacion en UN. Tio eble estas bona por la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco.

Nun ni diru kelkajn vortojn pri la Ligo de la Societoj de la Ruĝa Kruco. Kiam helpo ne kaŭzas diplomatiajn klopodojn, ĝi estas organizata de la Ligo de la Ruĝa Kruco. Tiu Ligo tiel helpas la viktimojn de inundoj, tertremoj, postmilitaj detruoj, ktp... Ekzemple, en Alĝerio, dum la milito, kiam temis pri vizitado de koncentrejoj, tiam estis la tasko de la Internacia Komitato. Hodiaŭ, kiam temas pri disdono de nutraĵo kaj vestaĵoj al vilaĝanoj sendomaj, tiam estas la laboro de la Ligo. Tiu Ligo petas la helpon de la Naciaj Societoj de la Ruĝa Kruco, kies donacojn ĝi kunigas.

Tiun ĉi someron, de la 27-a de aŭgusto ĝis la 10-a de septembro, okazos en Ĝenevo gravega kongreso por la centjara Jubileo de la Ruĝa Kruco. Dum tiu manifestacio, kiu grupigos delegitojn el 90 landoj, okazos du internaciaj konferencoj, malfermiĝos ekspozicio kaj laboros edukistara kongreso. Mi esperas, ke tiu festo renkontos grandan eĥon tra la tuta mondo kaj ĉefe en Svislando kaj tiel rememorigos al la popoloj, ke malgraŭ 100 jaroj da laboro la Ruĝa Kruco ne povis forigi el la diplomatiak kutimoj la uzon de la perforto. Sed hodiaŭ la solviĝo de tiu problemo fariĝas ĉiam pli urĝa. La Ruĝa Kruco ne nur ekzistas por humanigi la militojn, sed por komprenigi al la homoj, ke ili devas lukti kontraŭ la ŝovinismoj, naciismoj, militismoj, imperiismoj, politikaj dogmoj, se ili volas iam povi solvi la problemojn, kiuj kondukas la homaron al nuklea milito.

La Ruĝa Kruco per sia laboro atakas tabuojn. Pro tio ĝia laboro progresas tiel malrapide. Ĉu ni devos atendi ĝian duan centjaron por vidi ŝanĝon en la internaciaj rilatoj? Aŭ ĉu 1963

permesos komprenigi al sufiĉe vastaj gent-tavoloj, ke per la monda tribunalo en Den Hago, per vera monda federacio kaj per efektivigo de la homaj rajtoj oni povus solvi la hodiaŭajn mondajn problemojn kaj nutri, vesti, doni edukadon al la suferantoj sur la tuta Tero. La Ruĝa Kruco per sia standardo konstante rememorigas la parabolon de la bona samaritano. Ĝi flirtigas sian flagon por ĉesigi konfliktojn. Povu ĝi iam venki super la egoismo kaj la religio de la mono. Tio estis la deziro de ĝia iniciinto Henri Dunant kaj tio restas la deziro de ĉiuj svisoj, kiujn la moderna komforto ne dormigas.

Vi aŭdis prelegon en esperanto el Svislando. Parolis Claude Gacond pri la centjara festo de la Ruĝa Kruco. Ĝis reaŭdo !

-oOo-